WIKIPEDIA

Ujgura lingvo

La **ujgura lingvo** (*ئۇيغۇر تىلى*, *Uyghur tili*, *ئۇيغۇرچە Uyghurche*) apartenas al la tjurka lingvaro ene de la altaja lingvaro. Ĝi estas parolata de la ujguroj en Ĉinio (7 milionoj da parolantoj) kie ĝi estas agnoskata kiel oficiala kune kun la ĉina lingvo kaj en Kazaĥio ĉirkaŭ 300 mil personoj parolas ĝin. Krom tio, ĝi ankaŭ havas malgrandajn komunumojn en Mongolio kaj en aliaj landoj de Centrazio kaj en Usono kaj aliaj landoj kie ili ekziliĝas. La ujguroj estas unu el la ĉefaj etnaj malplimultoj oficiale agnoskataj de la Popola Ĉina Respubliko.

Ekde la 10-a jarcento, kiam la ujguroj islamaniĝis, la ujgura estas skribata per varianto de la araba alfabeto uzata en la persa kun kelkaj diakritaj signoj aldonitaj por reprezenti la proprajn ujgurajn vokalojn. En la 1970-aj jaroj, la registaro de Ĉinio volis reformi la skribon per adoptado de la latina alfabeto. Tamen, en la jaro 1987 oni revenis al la tradicia araba alfabeto kaj estis forlasita oficiale la latina skribo, kvankam ĝi estas hodiaŭ uzata por la komunikado per interreto aŭ SMS.

Literoj

Skribadaj vojoj

Eksaj Arabaj	Eksaj Latinaj	Eksaj Cirilaj	Nunaj Latinaj	Pronunco laŭ esperanto	Internacia Fonetika Alfabeto
	1965-1982		**2001-**		
ا	A a	А а	**A a**	a	ɑ
ب	B в	Б б	**B b**	b	b
چ	Q q	Ч ч	**Ch ch**	ĉ	ʧ
د	D d	Д д	**D d**	d	d
ه	Ə ə	Ə ə	**E e**	(ne)	æ
ې	E e	Е е	**É é**	e	e
ف	F f	Ф ф	**F f**	f	f
گ	G g	Г г	**G g**	g	g
غ	Ƣ ƣ	Ғ ғ	**Ğ ğ**	voĉa ĥ	ɣ
ھ	H h	Һ h	**H h**	h	h
ی	I i	И и	**I i**	i	ɪ
ج	J j	Ж ж	**J j**	ĝ	ʤ
ك	K k	К к	**K k**	k	k
ل	L l	Л л	**L l**	l	l
م	M m	М м	**M m**	m	m
ن	N n	Н н	**N n**	n	n
ڭ	ng	Ң ң	**ng**	ng	ŋ
و	O o	О о	**O o**	o	o
ۆ	Ө ө	Ө ө	**Ö ö**	(ne)	ø
پ	P p	П п	**P p**	p	p
ق	Қ қ	Қ қ	**Q q**	(ne)	q
ر	R r	Р р	**R r**	r	r
س	S s	С с	**S s**	s	s
ش	X x	Ш ш	**Sh sh**	ŝ	ʃ
ت	T t	Т т	**T t**	t	t
ۇ	U u	У у	**U u**	u	u

ۈ	Ü ü	Ү ү	**Ü ü**	(ne)	y
ۋ	V v	В в	**V v**	v	v, w
خ	H h	Х х	**X x**	ĥ	x
ي	Y y	Й й	**Y y**	j	j
ز	Z z	З з	**Z z**	z	z
ج	Ʒ ʒ	Ж ж	**Zh zh**	ĵ	ʒ

Aliaj projektoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Ujgura_lingvo&oldid=6820130"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:06, 27 dec. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.